



## **PROVIZORA PROGRAMO DE LA 17A NoRo**

**27a de decembro 2018 – 3a de januaro 2019  
en Wiesbaden, Germanio**

# Bonvenon al la 17a Novjara Renkontiĝo!

Gekaraj partoprenantoj,

kiel ĉiam vi tenas nur provizoran programon en viaj manoj!!! Ĉijare vi ne trovas la **salonoindikojn** en la programkajero! Vi trovos ilin sur la informtabulo. Do gravos kontroli la aktualan programon tie! ☺

Do bonvolu ĉiam certiĝi, ĉu ne estas ŝanĝoj (aŭ eraroj?) ĉe la programeroj kiujn vi planas ĉeesti (aŭ gvidi!!!).

Ankaŭ ĉi jare ni enmetis etajn paŭzojn inter la programeroj. Mi petas ke ĉiuj subtenu la planon, ĉar prezentantoj kaj spektantoj ja bezonas sian tempon por prepari, veni, iri ktp.

La aktualan **VALIDAN** programon vi trovas kutime en la **ENIREJO** sur la **informtabulo** jam **malfrue la antaŭan vesperon, aŭ plej laste matene.**



Se vi havas problemojn aŭ dezirojn pri **ŝanĝoj de viaj propraj kontribuoj** aŭ aldonajn **proponojn**,

bonvolu alparoli **Betti Maul** **Ne ŝanĝu mem**, ĉar nur ŝi havas la aktualan version

kun salonodisdonado ktp.

Koran dankon! **TEKNIKAN HELPON** (projekciilojn, komputilojn, muzikilojn, kablojn ktp.)

VI RICEVAS DE **KLAUS RUMRICH**!!!

Bonvolu informi lin **frue** kion vi bezonos dum via prezento!





Kiel teknika helpanto aldoniĝis **Laurent Burgbacher**




# Klarigoj pri la domo: Salonoj por la programeroj

## TERETAĜO



teretaĝo B6 ĝis B8

# SUBA ETAĜO subteretaĝe B1 – B5



## DOMO A

A1

A2

A3

A4

A5

## DOMO B

B1

B2

B3

B4

B5

B6

B7

B8

**GRAVA INFORMO:** Ankaŭ ĉi-foje la **kostoj por perditaj ŝlosiloj** estas iom altaj, nome **80 EUR**.

Eblas lasi la ŝlosilon ĉe la akceptejo kaj repreni de tie ĝis la 24-a horo. Por la ĉambro estas *normala* ŝlosilo (metala). Por eniri la domojn, ĉefe vespere kaj nokte, aldone ekzistas iu plastaĵo kun elektronika malfermilo.

**ATENTU** ke la 3an de januaro 2018 ni devas esti forlasintaj niajn dormejojn jam je 9:30 horo!!!

**Ceteraj salonoj en kiuj okazos programeroj:**

**SALONO**

**PIANEJO**

**KAFEJO**

**Lifto ekzistas nur en domo B.** Tio signifas, ke estas facile atingeblaj nur la salonoj en domo B kaj en la teretaĝo de domo A, ne tiuj de la subteretaĝo de domo A (A1 ĝis A5).

## Mallongigoj en la programo:

**D = diskutrondo**

**E = Ekskurso**

**ELR = Esperanta Literatura Rondo**

**IVU = Internacia Vintra Universitato**

**KABINETO =** Novaĵo ĉijare por ĉiuj diligentuloj kaj partoprenantoj kiuj bezonas iom da laboretoso kaj trankvilo estas nia kabineto. En tiu salono oni ne rajtas brui, sed studi, labori, prepare prelegojn ktp. Vi trovas la kabineton en domo \_\_\_\_\_ en la salono \_\_\_\_\_

**LIBROSERVO** Ni ĝojas ankaŭ ĉijare bonvenigi la **libroservon kun Gerd Jacques**. Vi trovas ŝin kaj ĝin en la salono \_\_\_\_\_ ,

kiu ankaŭ uzatas por aliaj programeroj. **Pri la malfermhoroj vi trovos indikilojn apud la \_\_\_\_\_ (vidu  sur la mapo)!**

**L = ludo**

**ML = manlaboro gvidata de Nicky Janssen kaj helpantoj (la aktualajn ofertojn trovu sur la taga programtabelo sur la informtabulo!)**

Por ornami la balejon iom pli ol la domo ni faros tion mem: Ĝis la 31a tagmeze ni produktos ornamaĵojn, diversspecajn, ne nur kun etaj infanoj. **Ĉiuj helpaj manoj bonvenas!**


**P = prelego / prezento**

**RT = rondotablo / interŝanĝogrupa**

**S = Seminario**

**GUFUJO revenis! = Nokta teejo** kun kandeloj, mallaŭta (akompana) klasika muziko, tabloludoj, noktomeze iu laŭtlegado (aŭ akustika koncerto. Ĝi ekestis kontraŭe al la bruaj, fumaj kaj alkoholaj diskoteko kaj trinkejo en junularaj kongresoj - por babili trankvile kaj dume trinki teon. Vi trovos la gufujon post la vespera programo en \_\_\_\_\_ sub la sperta gvido de Vera Acsádi.

**FILMO:** Depende de la alportitaj filmoj ni prezentos **ĉiunokte** filmon. Nomon kaj ejon vi trovos sur la **informtabulo!**

Ekde 14:30	ALVENO ALVENO ALVENO
18:00-20:00	Vespermanĝo
20:15	<b>BONVENIGO KUN koncizaj INFORMOJ PRI EJO, PROGRAMO, KTP.</b>
	<b>INTERKONA VESPERO</b> poste <b>Interŝanĝo internaciaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj</b> <b>Kun prezento de la alportitaj frandaĵo</b> (bv. prezenti dum kelkaj minutoj: Kion vi alportis, kie kaj kiam estas tipa ...)
	

7:30	Ĉigongo Nan Matthias-Wang						
7-9:30	Matenmanĝo						
	„infan“programo & ludoj & sporto &...			prelegoj & diskutrondoj & ...		KURSOJ	
9:20	ML: Desegni per kreto I Uli Diestel	Budaisma plenkonscia meditado Laurent Burgbacher	<b>P: La vidindaĵoj de Wiesbaden Ulrich Matthias</b> 10:10 urbogvidado tra Wiesbaden Ulrich Matthias (listo sur informtabulo!)	Tradukateliero István Ertl & Brian Moon	K: Orientala / veldancado I Martina Sachs-Bockelmann	E-o-kurso por komencantoj	E-o-kurso progresantoj Yves Bellefeuille
10:55	Paŭzo						
11:00	ML: Ornamaĵoj por la balo Nicky Janssen	L: Kreado de Tabuo-kartaro porinfana Mirjam Walter	Tutsemajna foto-konkurso enkonduko Maureen Hurstel	Kantado kun etaj infanoj Nikola Markarian	<b>IVU: Kion ni vidas sur Marso? Bernard-Regis Larue</b>	K: Desegni domon per <i>Sketch up</i> I Aleks Clabaut	
12:00	Tagmanĝo 1a grupo						
13:00	Tagmanĝo 2a grupo						
13:20	ML: Feltumado de frotpurigiloj Bianka Jacobsen-Mulongo	L: Kreado de Tabuo-kartaro por gejunuloj Mirjam Walter	Unua renkontiĝo por muzikemuloj Stefan Burkert PIANEJO	<b>P: Afrikaj lingvoj Javier Moleon</b>	D: Pri aktualaj temoj (listo sur informtabulo) Jesper Jacobsen		Mazi-Kurso Valère Doumont
14:20	Paŭzo						
ba	ML: Hundeto el papero Flora Walter		Ĵonglado Klaus Rumrich	L: Kurso pri Go (1a parto) Valère Doumont	<b>P: Kiel aŭskultisian korpon. Lydia Bloch</b>	S: Esperanto-poezio I Anina Stecay	Esperanto-kurso por komencantoj Gunter Neue
15:55	Paŭzo						
16:00	ML: Ornamaĵoj por la balo Nicky Janssen	Kurso pri <i>Rubi-kubo</i> / Toninho László	Novaj ludoj por ni I (vidu liston) LUDEJO	<b>P: Seksa egaleco en Esperanto Markos Kramer</b>			Gramatikaĵo Gunter Neue
16:55	Paŭzo						
17:00	ML: Trikado Betti Maul	Naskiĝtagfestoj	Aligatorejo Anna's Hurstel k.a.	Dancado Martin Strid		Sindefendado I Tobias Menzel	
18 – 20	Vespermanĝo						
19:00	Pijamaj rakontoj Nicky Janssen		ML: Fotado Yasna kaj Maureen		Kvarvoĉa ĥoro Jesper Jacobsen PIANEJO		
20:15	<b>Koncertas Ludger Schmeink</b>						
ĉ.22:30	TABUO			Filmo		Gufujo	

7:30	Ĉigongo Nan Matthias-Wang								
7-9:30	Matenmanĝo								
9:20	„infan“programo & ludoj & sporto &...			prelegoj & diskutrondoj & ...			KURSOJ		
	ML: Kirigami Valère Doumont		Budaisma plenkonscia meditado Laurent Burgbacher	P: Himalaja renkontiĝo kun fotoj de Nepalo Marc Cuffez	Ridjogo (9:20-10:20) Betti Maul	Voltrudoj István Ertl		E-o-kurso por komencantoj	
10:55	Paŭzo								
11:00	ML: Ornamaĵoj por la balo Nicky Janssen	Kantado kun etaj infanoj Nikola Markarian		IVU: La parko en Wörlitz Helmut Kländler	D: Pri aktualaj temoj (listo sur informtabulo) Jesper Jacobsen	S: Esperanto- poezio II Anina Stecay	K: Desegni domon per Sketch up II Aleks Clabaut	E-o-kurso progresantoj Yves Bellefeuille	
12:00	Tagmanĝo 1a grupo								
13:00	Tagmanĝo 2a grupo								
13:00	Ĉokoladaj bananoj Verdaj skoltoj	Muzeo Wiesbaden ekiro Ulrich Matthias (listo sur informtabulo!)			13:00 PENDIGO DE <b>SINPREZENTOJ</b>				
13:20	ML: Trikado Betti Maul	Renkontiĝo por muzikemuloj Stefan Burkert SALONO	Prezento: Fotoj de la lasta NoRo I Brian Moon	Revuo Esperanto Anna Striganova, Dima Ŝevĉenko	P: Amikoj de EsperantoLand Lu von Wunsch- Rolshoven	P: Rumanio Manuela Burghilea	Esperanto-kurso por komencantoj Gunter Neue	Mazi-Kurso Valère Doumont	
14:20	Paŭzo								
14:30	ML: Ornamaĵoj por la balo Nicky Janssen	<b>Scienca mirkvizo:</b> Kvizo pri surprizaj sciencaj malkovroj kaj teorioj Bart Demeyere			15:30 P: De la hitlera junularo ĝis la verda partio - vivo kaj aktivo en diversaj Germanioj Wilhelm Knabe (kun traduko de Christoph Knabe)			IVU: Simbola lingvo de fabeloj Anna Striganova	Gramatikaĵo Gunter Neue (- 15:30)
15:55	Paŭzo								
16:00	ML: Feltumi I Ines Frank	Kurso pri <i>Rubi-kubo</i> II Toninho László	Ĵonglado Klaus Rumrich	Sindefendado II Tobias Menzel					
16:55	Paŭzo								
17:00	ML: Feltumi I Ines Frank	Malstreĉiga gimnastiko Anna Dupechaud	Cirklodancoj Martin Strid						
18 – 20	Vespermanĝo								
19:00	Piĵamaj rakontoj Nicky Janssen	Kvarvoĉa ĥoro Jesper Jacobsen			PIANEJO				
20:15	<b>Kio okazos? Kvizo de Klaus Rumrich</b>								
POSTE	Novaj ludoj por ni II	Aligatorejo Annaïs Hurstel k.a.			Gufujo			Filmo	



7:30	Ĉigongo Nan Matthias-Wang							
7-9:30	Matenmanĝo							
	„infan“programo & ludoj & sporto &...			prelegoj & diskutrondoj & ...			KURSOJ	
9:20	ML: Ĉinaj ombroj (farado) Maureen Hurstel	Glacisketejo Wiesbaden ekiro Ulrich Matthias (listo sur informtabulo!)	Budaisma plenkonscia meditado Laurent Burgbacher	K: Orientala / veldancado II Martina Sachs-Bockelmann	P: De la Ruĝa Maro al la Morta Maro Amri Wandel	Tradukateliero István Ertl & Brian Moon	E-o-kurso progresantoj Yves Bellefeuille	Mazi-Kurso Valère Doumont
10:55	Paŭzo							
11:00	(? ML: Ornamaĵoj por la balo Nicky Janssen ?)	Fajro-skribado Verdaj skoltoj	Kantado kun etaj infanoj Nikola Markarian	P: Malĝustaj asertoj de lingvistoj pri Esperanto Lu von Wunsch-Rolshoven	D: Pri aktualaj temoj (listo sur informtabulo) Jesper Jacobsen	K: Desegni domon per Sketch up III Aleks Clabaut	E-o-kurso por komencantoj	
12:00	Tagmanĝo 1a grupo							
13:00	Tagmanĝo 2a grupo							
13:20	ML: Trikado Betti Maul	Kiel stabiligi ponton Aleks Clabaut	Renkontiĝo por muzikemuloj Stefan Burkert PIANEJO	IVU: La vivanta universo Amri Wandel		P: LGBTQ+ Dalila Propadović kaj Yasna Hernandez ?		
14:20	Paŭzo							
14:30	ML: Ornamaĵoj por la balo Nicky Janssen						Esperanto-kurso por komencantoj Gunter Neue	
15:55	Paŭzo							
16:00	ML: Kreu vian t-ĉemizon Nicky Janssen	ML: Fotado Yasna kaj Maureen		K: Leciono de la antikva meza egipta lingvo Pedro Hernandez	IVU: Interaktiva prelego pri Esperanto-lingva bildo de la mondo Ilona Koutny	RT: Plurecaj alternativoj kontraŭ dominado: rilatoj inter Esperanto, Linukso, pluramo, veganismo, Bahai Ĉesko Reale	Gramatikaĵo Gunter Neue	
16:55	Paŭzo							
17:00	ML: Kreu vian t-ĉemizon (daŭrigo) Nicky Janssen	Kurso pri Rubikubo III Toninho László	Ĵonglado Klaus Rumrich	Popoldancoj Martin Strid				
18 -20	Vespermanĝo							
19:00	Piĵamaj rakontoj Nicky Janssen		L: Ĉinaj ombroj (uzo) Maureen Hurstel	Kvarvoĉa ĥoro Jesper Jacobsen PIANEJO				
20:15	Fabeloj por ĉiuj Christoph Frank SALONO				Fabelo por la grandaj Christoph Frank SALONO			
poste	TABUO		Filmo	Gufujo			L: Rolludo - Verdaj skoltoj	

7:30	Ĉigongo Nan Matthias-Wang							
7-9:30	Matenmanĝo							
9:20	„infan“programo & ludoj & sporto & ...		prelegoj & diskutrondoj & ...			KURSOJ		
	ML: Desegni per kredo II Uli Diestel		Budaisma plenkoncisa meditado Laurent Burgbacher		IVU: La demografia stato de Esperanto Amri Wandel		Voltrudoj István Ertl	E-o-kurso progresantoj Yves Bellefeuille I
10:55	Paŭzo							
11:00	ML: Ornamaĵoj por la balo Nicky Janssen	Murdoludo enkonduko! Ĉesko Reale	Kantado kun etaj infanoj Nikola Markarian	P: Privateco, valora homa rajto sub premo (diskuto sekvos je 14:30) Ilja de Coster			K: Desegni domon per Sketch up IV Aleks Clabaut	E-o-kurso por komencantoj
12:00	Tagmanĝo EN DOMO B 1a grupo							
13:00	Tagmanĝo EN DOMO B 2a grupo							
13:20	ML: Farado de bulokvastoj Ida Dijkstra	Murdoludo parto 1 Ĉesko Reale	Ĵonglado Klaus Rumrich	Renkontiĝo por muzikemuloj Stefan Burkert	ML: Trikado Betti Maul	D: Pri aktualaj temoj (listo sur informtabulo) Jesper Jacobsen		Mazi-Kurso Valère Doumont
14:20	Paŭzo							
14:30	ML: Fantomaj marionetoj parto 1 Christoph Frank	Murdoludo parto 1 Ĉesko Reale	Novaj ludoj por ni IV KAFEJO		D: Privateco, valora homa rajto sub premo (diskuto pri la prelego) Ilja de Coster			E-o-kurso komencantoj Gunter Neue
15:55	Paŭzo							
16:00	ML: Fantomaj marionetoj parto 2	Murdoludo parto 2		Ornami kaj prepari por la balo		P: Kurdoj kaj la kurda lingvo Arnulf Naif		Gramatikaĵo Gunter Neue
16:55	Paŭzo							
17:00	Malstreĉiga gimnastiko Anna Dupechaud	Murdoludo parto 2 Ĉesko Reale	ML: Ŝminkado de infanoj Tine Van den Bruel	Ornami kaj prepari por la balo	Kvarvoĉa ĥoro Jesper Jacobsen PIANEJO			
18:30	EN DOMO B SILVESTRA BUFEDO UNUE familioj kun MALGRANDAJ INFANOJ							
19:00	EN DOMO B KAJ POST ILI SILVESTRA BUFEDO POR Ĉiuj aliaj							
ĉirkaŭ 20:00	EN DOMO B Eko de la BALO Poste dancado en aparta dancejo							

	„infan“programo & ludoj & sporto &...	prelegoj & diskutrondoj & ...	KURSOJ					
8:00-13:00	MATENMANĜO KAJ TAGMANĜO							
10:00	Ĉigongo Nan Matthias-Wang (?)							
11:00	ETA NOVJARA PROMENO			GRANDA NOVJARA PROMENO				
12:00	<b>Novjara koncerto – diversaj artistoj Jesper &amp; Ludger, Anh Tuan</b> SALONO							
12-14	Tagmanĝo							
			<b>Ekde 13:00</b>					
13:20	ML: Fotado Yasna kaj Maureen	ML: Trikado Betti Maul	<b>Foiro de bonaj ideoj (enskribiĝu!)</b>		<b>IVU: Turing maŝinoj</b> Klaus Rumrich		<b>P: La floroj de malbono – filozofia interpreto</b> Bianca Muresan	Mazi-Kurso Valère Doumont
14:20	Paŭzo							
14:30	Ĉokoladaj bananoj Verdaj skoltoj	ML: Diversaj eblecoj Nicky Janssen	Ĵonglado Klaus Rumrich	K: Enkonduko en la rumanan lingvon Manuela Burghelea		D: Diskutrondo pri la nuna stato de la kataluna sendependismo Alex Humet		E-o-kurso pri Komencantoj
15:55								
16:00	L: Ĉinaj ombroj Maureen Hurstel	Renkontiĝo por muzikemuloj Stefan Burkert PIANEJO	L: Kurso pri Go (2a parto) Valère Doumont	L: Plurlingva skrablo Ĉesko Reale				E-o-kurso komencantoj Gunter Neue
16:55	Paŭzo							
17:00	Sindefendado III Tobias Menzel	Tutsemajna foto- konkurso – transdono de fotoj Maureen Hurstel		Popoldancoj Martin Strid	<b>LG: Prepari kune unu sanan, simplan, bonan vespermanĝon</b> Lydia Bloch		<b>P: Kio estas la rilato inter Esperanto kaj QR-kodoj (kvadrataj skaneblaj rapidrespondataj kodoj)</b> Eddy Van den Bosch	
18 – 20	Vespermanĝo							
19:00	Pijamaj rakontoj Nicky Janssen	Novaj ludoj por ni	Kvarvoĉa ĥoro Jesper Jacobsen PIANEJO	Tablotenisoturniro FINALO				
20:15	<b>Gijom' kaj Laurent koncertos</b>							
	TABUO		Filmo		Gufujo		SMALO Ĉesko Reale	

Wiesbaden, merkredo la 2a de januaro 2019

7:30	Ĉigongo Nan Matthias-Wang						
7-9:30	Matenmanĝo						
	„infan“programo & ludoj & sporto &...			prelegoj & diskutrondoj & ...		KURSOJ	
9:20	ML: Feltumi II Ines Frank		Budaisma plenkonscia meditado Laurent Burgbacher	P: Bach-floroj Bénédicte Hurstel	Mazi-Kurso Valère Doumont	E-o-kurso por komencantoj	E-o-kurso progresantoj Yves Bellefeuille
10:55	Paŭzo						
11:00	ML: Malgrandaj donacetoj Nicky Janssen		Kantado kun etaj infanoj Nikola Markarian		Voltrudoj István Ertl	P: Kiel via forko kaj trakforka efiko efikas al via sano? Cyrille Hurstel	K: Desegni domon per <i>Sketch up V</i> Aleks Clabaut
12:00	Tagmanĝo 1a grupo						
13:00	Tagmanĝo 2a grupo						
13:20	<b>Kvizo: Ne-kutimaj vortoj</b> Volfram Diestel						
14:20	Paŭzo						
14:30	ML: Fotado Yasna kaj Maureen	Ĵonglado Klaus Rumrich	E: <b>Majenco</b> Bianka Jacobsen- Mulongo (listo sur la informtabulo!)	ML: Trikado (eble) Betti Maul		P: Duoblaj sencoj kaj vortludoj en pluraj lingvoj Ĉesko Reale	Esperanto-kurso por komencantoj Gunter Neue
15:55	Paŭzo			Paŭzo			Paŭzo
16:00	ML: Diversaj eblecoj Nicky Janssen	Renkontiĝo por muzikemuloj Stefan Burkert PIANEJO		P: La psika malsano psikozo Ite Tytgat			Gramatikaĵo Gunter Neue
16:55	Paŭzo						
17:00	Malstreĉiga gimnastiko Anna Dupechaud			L: Ĉinaj ombroj Maureen Hurstel			
18 – 20	Vespermanĝo						
19:00	Piĵamaj rakontoj Nicky Janssen		Aligatorejo Annaïs Hurstel k.a.		Kvarvoĉa ĥoro Jesper Jacobsen PIANEJO		
20:15	<b>Internacia vespero</b>						
~ 22:00	Gufujo						

**PRISKRIBOJ DE LA PROGRAMEROJ:** Jen sekvas eta superrigardo pri granda parto de la kontribuoj laŭ kategorioj:

Atentu, ke la tempo-indikoj rilatas la komencon de la programero. Se la salono poste liberas, la programero **povas kaj rajtas daŭri pli longe**.

### **ESPERANTO-lingvo-KURSOJ:**

\*\*\*\*\*

Por **komencantoj** je 9:20 (diversaj instruistoj) kaj 14:30 (Gunter Neue, verŝajne kun TESI) ĉiutage (1an de januaro 2016 je 16:00)

Por **progresantoj** je 9:20 (Yves Bellefeuille) ĉiutage (**ne** 1an de januaro)

**Mazi-kurso** por komencantoj kaj infanoj ĉiutage je 13:20, 2an1an je 9:20 (Valère Doumont)

**Serio de lingvaj temoj** – diversaj detaloj pri gramatiko - Gunter Neue, kutime je 16:00. Konate Esperanto estas facile lernebla lingvo. Tamen ekzistas malmultaj stumbligiloj, kiuj foje donas problemeton. La serio de lingvaj temoj taŭgas kaj por progresantoj kaj por jam spertaj parolantoj de nia kara verda lingvo, kiuj estas scivolemaj, ĉu ili jam tute bone regas la sekvajn temojn:

1. „n'-finaĵo (28a de dec. 2015)

La „n'-finaĵo kutime esprimas la objekton de la (transitiva) verbo, por kio ĝi krome estas uzata, ni priparolas kaj poste praktikas en amuzaj ekzercoj (aŭ inverse).

2. lando- kaj popolnomoj (29a de dec. 2015)

La sistemo de lando- kaj popolnomoj donas al Esperantisto foje problemon. Por plifaciligi ilin, venu spekti prelegon pri la ĝia historio kaj evoluado. Ni priparolos la aferon kaj praktikas la sistemon ekzerce.

3. pronomoj, precipe „si“ respektive refleksivo (30a de dec. 2015)

Ne estas sekreto, kiam oni uzas „si“ aŭ alian pronomon. Venu por priparoli la regulojn kaj ekzerci iliajn aplikojn. Poste vi certe klare rekonas, ĉu estas la sama paro, kiu vidos filmon: Li kaj lia edzino iras en la kinejon. - Li kun sia edzino iras al la kinejo. (... aŭ ĉu vi jam scias?)

4. „-ig-“ kaj „-iĝ-“ respektive transitiveco kaj netransitiveco de Esperantaj verboj (31a de dec. 2015)

Foje ekestas demando, parolante pri iu ajn temo, ĉu uzi „-ig-“ kaj „-iĝ-“ aŭ eble tamen ne...??? Kiel elturniĝi? - Tion ni priparolos kaj trovos solvojn. Estos aŭdkomprenekzerco kiu tuŝas la temon kaj teksto kun kelkaj plenigendaj spacoj.

5. enigmoj (2a de jan. 2016)

Je la fino de tiu serio ni rajtas iom ripozi kaj amuziĝi per enigmoj. Poste ni scios, kiu havas la zebron kaj kies plej ŝatata trinkaĵo estas akvo...

### **IVU: La 11-a sesio de Internacia Vintra Universitato dum la 17-a NoRo**

**IVU** estas la vintra ekvivalento de la *Internacia Kongresa Universitato* (IKU) okazanta dum la UK en la somero. Dum ok jaroj la *Internacia Vintra Universitato* (IVU) okazis en la Internacia Festivalo (IF). Simile al la AIS-IKU-kursoj, dum IVU-sesio okazas pluraj AIS-kursetoj. Jam la trian fojon IVU okazas dum la Novjara Renkontiĝo, ĉi-jare okazos kelkaj kursoj. La kursoj havos ekzameneton, kiuj partoprenos ĝin ricevos AIS-atestojn.

### **Diskuttrondoj (D) kaj Ronda tablo (RT)**

Ĉiutage ni volas komune diskuti pri **diversaj temoj**:

Diskutrondoj kun Jesper Jacobsen: Mi mallonge enkondukas diversajn aktualajn temojn por instigi la ĉeestantojn al vigla diskutado.

## MUZIKO

**Kantado kun etaj infanoj** de la tipaj kantoj de **REF** (Renkontiĝo por Esperanto-familioj), 5 foje matene, Nikola Markarian

**Komuna kantado / muzikumado.** 5 foje, Stefan Burkert kaj aliaj

**Popoldancoj** kun Martin Strid

**Jesper Jacobsen: Ĥoro:** Vi ŝatas kanti kvarvoĉe? Ankaŭ ĉi-jare la repertuaro ŝanĝiĝis! Mi proponas elekton de kelkaj kantoj.

## LUDOJ

**Novaj ludoj por ni:** Denove vi havos la eblecon prezenti kaj konatigi aliajn kun ludoj (novaj kaj malnovaj,) kiujn vi tre ŝatas. Estu bonvenaj konatigi ankaŭ ĉijare aliajn per viaj plej ŝatataj breludoj (aŭ aliaj) Enskribiĝu en la liston ĉe la informtabulo por anonci vian kontribuon! La prezentoj povas okazi tage kaj nokte. Ni jam metis kelkajn eblecojn en la programon, sed sentu vin liberaj, aldoni viajn proponojn (ankaŭ je aldonaj tempoj) **en la liston** (NE en la programon! Tion Betti faros!!!).

## Laborgrupoj kaj atelieroj

**Budaisma plenkonscia meditado, por bone komenci la tagon. Laurent Burgbacher**

Ĉijare ĉiumatene (escepte de la 1a de januaro) por ĉirkaŭ 45 minutoj, por iom pli mediti kaj multe malpli diskuti.

**Traduk-atelieron** kun Brian Moon kaj István Ertl (3 x)

Nur tradukante oni povas spertiĝi pri tradukado. Celo de nia ateliero estas spertigi pri tradukado uzante tekstojn kiuj jam ekzistas en pluraj lingvoj. Tiel la afero malfermiĝas al laŭeble multaj partoprenantoj de NR.

**Voltrudoj de István Ertl\* (3 x)**

Mallonga historio kaj malpli mallonga praktikado de vortludoj en Esperanto. Sur la spuroj de Raymond Schwartz. Tipoj de vortludoj, komparoj al vortludoj en aliaj lingvoj. Kunportu viajn kalemburojn hejmfaritajn, au fabriku viajn kontraŭknavojn surloke! (3 foje 60 min.)

## PROGRAMO POR INFANOJ KAJ ALIAJ

**Trikado** ŝtrumpetoj, bestetoj, nanetoj ktp. kun Betti Maul (ekde 28a 12a 14:30, plurfoje, eblas unufoja partopreno)

**Feltumi** Bianka Jacobsen-Mulongo (1x) kaj Ines Frank (2 x)

**Pijamaj rakontoj** por etaj kaj malpli etaj infanoj kaj granduloj. **Nicky Janssen**

**Tabloteniso-turniro:** Vi ŝatas ludi tablotenison? Venu por enskribiĝi al la turniro. Cyrille Hurstel (29a12a 11:00)

\*atentu la intencan preskeraron en la titolo...

\*\*\*\*\*

## Vespera programo:

La tuta Esperantujo ŝuldas grandan dankon al la artistoj, kiuj multe vivigas nian komunumon. Ni proponas ankaŭ ĉi-foje esprimi iom el nia danko al la koncernaj artistoj per monkolokado post la prezentoj. Memoru jam antaŭ la prezentoj kunporti iom da mono tiucele.

**27a de decembro 2017 - INTERKONA Vespero** kun poste Interŝanĝo de internaciaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

**28a de decembro 2017 - Koncertos Ludger Schmeink**

**29a de decembro 2017 – Klaus Rumrich - Kvizo Kio okazos ?**

**30a de decembro 2017 - Fabela vespero kun Christoph Frank**

**1a de januaro 2018 – Koncertas Gijom' kaj Laurent**

**2a de januaro 2018 - INTERNACIA Vespero**

**E Pri EKSKURSOJ vidu apartajn anoncojn sur la informtabulo !!!**

**Priskriboj de la programeroj** laŭ alfabeto sinsekvo de la personaj nomoj :

Ĉiu [prelegoj](#) estas printitaj [ruĝe](#) en la tagaj programotabeloj.

Aleks Clabaut: **Kiel stabiligi ponton** - La partoprenantoj devas trovi solvojn por stabiligi maketon de ponto. 2 horoj

Aleks Clabaut: Kurso: **Desegni domon pere de *Sketch Up*** - Necesas propra komputilo, jam kun la programo *Sketch Up*. 5 fojoj po 1 horo

Amri Wandel

- 1. IVU: La demografia stato de Esperanto** (Kiom da Esperanto-parolantoj troviĝas en la mondo?) - laŭ prelego en la Esperantologia Konferenco en Lisbono,
- 2. IVU: La vivanta Universo** - pri la ver ŝajna abundo de plandoj kun vivo, okaze de la elsendo de la du spacoteleskopoj, TESS (2018) kaj James Webb (2019), kiuj eble trovos la unuajn vivspurojn sur foraj planedoj.
- 3. P: De la Ruĝa Maro al la Morta Maro** - ekologio kaj paco en la Mezoriento. Okaze de la 20-a Israela Kongreso kaj la MONA-kunveno, en Eilat/Akaba 2019

Anh Tuan CLABAUT: L: **Movigaj ludoj por infanoj** (2 x)

Anh Tuan CLABAUT Koncertos dum la **Novjara Koncerto**

Anina Stecay S: **Esperanto-poezio - seminarieto** kun praktika interpretado (en 2 partoj)

Kelkajn homojn poezio enuigas, por aliaj ĝi estas iomete timiga. Denove aliaj opinias, ke poemoj nur prezentas elegantan bla-bla-on. Se vi ĉiam sentis, ke poemoj eble povus esti interesaj, sed ili al vi restas nekompreneblaj ĝis nun, mi bonvenigas vin en la seminarieto. Kune ni rigardas kelkajn esperantajn poemojn: espereble vi spertos, ke legi kaj interpreti poezion povas esti plaĉa okupo kaj krome malfermas novan vojon al nia lingvo.

**E** Anina Stecay povas **ĉiĉeroni tra Frankfurto**. Se vi interesiĝas, **enskribiĝu en la liston** sur la informtabulo.(?)

Anna Striganova **IVU: Simbola lingvo de fabeloj**: Dum jarcentoj geavoj rakontis al genepoj fabelojn – tio estis kutime, kvazaŭ spirado aŭ manĝado. Nur en la 19-a jarcento popolaj fabeloj iĝis materialo ne nur por rakontado aŭ kolektado, sed ankaŭ por sciencaj laboroj de fililologoj kaj historiistoj. Post longaj jaroj de lernado kaj kolektado evidentiĝis, ke multaj fabelaj motivoj kaj herooj preskaŭ sendiference aperas en fabeloj de diversaj popoloj. Naskiĝis dekoj da nesciencaj teorioj, intereso al fabeloj de tago al tago grandiĝis. Kiam la ondo de tiuj superstiĉoj finfine estingiĝis, restis klara, tute scienca kaj ĝis nun aktuala teorio, ke sen iu ajn fizika ligo, sen iuj pruntoj, lasamaj fabelaj motivoj naskiĝis el ordinara homa vivo: el amo al vivo kaj timo antaŭ morto, el rilatoj kun naturo kaj bestoj, el seksa diverseco, el maturado de homo kaj popolo – do el tiuj eroj de homa vivo, kiuj samtempe estas bazaj por ĉiu homo, en ĉiuj epokoj, en ĉiuj landoj.

Anna Dupéchaud - **Malstreĉiga gimnastiko** (3 x la 29an, la 31an de dec. kaj la 2an de jan.)

Annaïs Hurstel, Anh Tuan Clabaut kaj Yasna Hernandez **Aligatorejo**: Venu ekzerci viajn nefortajn lingvojn! Ĉiuj lingvoj estas permesataj, nur ne viaj gepatraj lingvoj kaj ne Esperanto!

Arnulf Naif **P: Kurdoj kaj la kurda lingvo**. Historio kaj kulturo de Kurdujo (Kurdistano). Trajtoj de kurdaj lingvo kaj dialektoj. Komparo kun aliaj hindeŭropaj lingvoj.

Bart Demeyere - **Scienca mirkvizo**

Bénédicte Hurstel **P: Bach-floroj**

Bernard-Régis Larue **IVU : Kion ni vidas sur Marso** (AIS) Marso estas la plej pristudata planedo: Konstante kosmoŝipoj kaj robotoj esploras ĝin. Tio liveris inter alie belegajn bildojn kiujn ni kune spektos. Tiel ni malkovros la spektaklajn pejzaĝojn de nia najbarino, kaj la interesajn fenomenojn tie.

Betti Maul **Trikado**: Kiu emas triki etajn bestojn, ĉapon, ludilojn ktp. aŭ lerni triki estu bonvena! Ni ankaŭ alportis lanon kaj trikilojn por tiuj kiuj ne kunhavas / posedas tiaĵojn.

Betti Maul **Ridjogo?**

Bianka Jacobsen-Mulongo ML: **Feltado de frotpurigiloj**

**E** Bianka Jacobsen-Mulongo : **Ekskurso al Majenco** (Mainz)

Brian Moon **Bildprezento pri la 16a NoRo en Saarbrücken**

Brian Moon **Tradukateliero** kun István Ertl (3 x)

Ĉesko Reale

1. RT: ronda tablo: **Plurecaj alternativoj kontraŭ dominado: rilatoj inter Esperanto, Linukso, pluramo, veganismo, Bahai** 30.12. je 16:00-18:00 (ebla fino, ne deviga)



2. **Murdoludo: Rolludo** por kunludantoj ekde 10 jaroj! ĉirkaŭ 5 gŝs 50 personoj 31.12. enkonduko, reguloj, teamkreado je 11:00, prologo je 11:30 – tagmanĝo, ekde 13:20 ludo (akto 1-3) kulpigoj, malkaŝo kaj premiigo je 17:00 (provizora tempoplano)

3. L: **Plurlingva skrablo** 1.1. je 16-18:00

4. L: **SamtempMultlingvoAŭskultadLudo** (SMALO) 1.1. post la koncerto

5. **P** Duoblaj sencoj kaj vortludoj en pluraj lingvoj 2.1. je 11:00

**Christoph Frank - Fabela vespero:**

1. **Peĉulo kaj Feliĉa**(franca)

2. **La urso-simila giganta brava fama kaj ĉie timata heroo Fin** (irlanda)

Post paŭzo nepre **nur por plenkreskuloj kaj gejunuloj:**

3. **Tech O' Kane kaj la kadavro** (irlanda)

Christoph Frank – **Fantomoj:** Ni **konstruas simplajn fantomajn marionetojn** kaj ekzercas per ili **pupludadon kaj dancon** en nigra lumo. Por etaj infanoj sub 10 jaroj (samtempe kun la rolludo por pli grandaj)

Cyrille Hurstel organizos la **tablo-tenisan turniron**.

Cyrille Hurstel **P: Prelego pri nutrado:** Kiel via forko kaj trakforka efiko efikas al via sano?

Dalila Propadović kaj Yasna Hernandez **P: LGBTQ+** Temas pri ĉiu homo, kiu ne estas vidata kiel *normala homo* rilate al sekso kaj/aŭ amo.

Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova - **Revuo Esperanto** paperforma kaj reta: **la redaktoroj** prezentas kaj renkontiĝas kun legantoj

Flora Walters: ML: **Kreu vian propran hundeton aŭ kateton** (el papero)! Ĉu viaj gepatroj ne permesas havi al vi hejmbestojn? Ĉu vi havas alergion kontraŭ ili? Aŭ ĉu simple mankas al vi mono por aĉeti kaj prizorgi ilin? Venu ĉi tien kaj faru vian propran beston el papero!"

Gijom' **Koncerto**

Helmut Klünder **P: La parko en Wörlitz**

Ida Dijkstra - ML: **Farado de bulokvastoj**

Ilja de Coster: **P** Prelego kaj diskutrondo (du programopartoj)

**Privateco, valora homa rajto sub premo:** Kial privateco gravas kiel homrajto? Kiel nuntempe privateco estas subminaco? Kiel funkcias datum minado?

Ilona Koutny: **IVU: Interaktiva prelego pri Esperanto-lingva bildo de la mondo**

Ines Frank ML: **Feltumadon: Ĉenoj aŭ ŝlosilpendigiloj** kun feltitaj bidoj; **legosignojn** (2 x)

István Ertl **Voltrudoj** (vortludoj) (3 x); **Tradukateliero** kun Brian Moon (3 x)

Ite Tytgat **P: Psikozo** - prelego pri psika malsano nomita psikozo. Mi ne estas kuracistino sed per propra sperta eklernis pri ĝi.

Javier Moleon **P: Prelegeto pri afrikaj lingvoj.** Ĉu vi scias NENION pri afrikaj lingvoj kaj do volas aŭdi, en tre mallonga tempo, la plejajn bazaĵojn priajn? Venu do!

Jesper Lykke Jacobsen D: **Diskutrondoj pri aktualaj temoj.** La temojn vi trovos sur la informtabulo!

Jesper Lykke Jacobsen **Kvarvoĉa ĥoro**

Klaas Dijkstra - Prezento de **diversaj filmoj, ekz. *Night on Earth*** kaj aliaj filmaĵoj **La aktualan filmon vidu sur la informtabulo!**

Klaus Rumrich K: **Ĵonglokurso**

Klaus Rumrich: **Kio okazos?** Kvizo

Klaus Rumrich **IVU: Turing-maŝinoj kaj kalkulebleco**

Laurent Burgbacher K: **Plenkonscia meditado**

Laurent Burgbacher **Koncerto** kun Gijom'

Ludger Schmeink koncertos: **La Novjara Koncerto** kun Jesper Lykke Jacobsen kaj **vespera koncerto**

Lu von Wunsch-Rolshoven **P: Malĝustaj asertoj de lingvistoj pri Esperanto** Oni povus kredi, ke lingvistoj estus tiuj sciencistoj, kiuj plej proksimas al la relative nova lingvo Esperanto, kaj ke ili do estus bone informitaj. Bedaŭrinde oni povas konstati, ke multaj lingvistoj havas sufiĉe erarajn ideojn pri Esperanto (neniu literaturo, neniuj aŭtoroj, neniuj vortludoj, neniuj kantoj, neniuj denaskuloj, parolata nur dum kongresoj, neniuj lingvoŝanĝiĝo, same malfacile lernebla por ĉinoj kiel aliaj eŭropaj lingvoj k. a.). Tion mi prezentos kaj eble ni pripensu, kiel informadi lingvistojn.

Lu von Wunsch-Rolshoven **P: Amikoj de EsperantoLand:** Organizi la Novjaran Renkontiĝon estas unu grava agado de EsperantoLand. Gravas ankaŭ kontribui al la disvastiĝo de Esperanto, al la kreskigo de Esperantujo. Kiel ni povas atingi informiĝon de lingvistoj pri la reala Esperantujo, por ke ili ĉesu misinformadi la mondon pri nia lingvo? Kiel ni povas organizi kampanjon ĉe instruistoj, por ke ili informadu siajn lernantojn almenaŭ dum unu horo pri Esperanto?

Lydia Bloch **P:** Parto 1: **Kiel auskulti sian korpon por bonfarti.** Parto 2: **Prepari kune unu sanan, simplan, bonan vespermanĝon** (malgranda grupo)

Manuela Burghilea **P: Rumanio** Mi esperas povi respondi al viaj demandoj kaj scivolemoj.

Manuela Burghilea K: **Enkonduko en la rumanan lingvon.** Mi ĉiam feliĉas kiam mi vidas ke estas intereso por ĝi :-). Kutime estas la forgesita lingvo de la latindevena familio. Mi tre fieras okazigi ĝin tiujare, ĉar en 2018 ni festas la centjariĝon de Rumanio. Miaj ĝisnunaj scioj ĉefe rilatas al lingvoj, mi studis la francan, la portugalan, la germanan, la anglan, la hispanan, kaj mi esperas en NR instrueti la rumanan ankaŭ per kompara perspektivo.

MARC CUFFEZ **P: Himalaja renkontiĝo 2018** kun fotoj de Nepalo

Markos Kramer **P: Prelego kun diskutrondo pri Seksa egaleco en Esperanto:** Ĉu J-riismo estas bona solvo? En diversaj lingvoj pli kaj pli da homoj sentas la bezonon esprimi sin en sekse egaleca maniero. Interalie, multaj homoj sentas la bezonon paroli pri aliaj homoj sen mencii ilian sekson, kaj havi esprimmanierojn, kiuj ankaŭ inkluzivas homojn, kiuj estas nek nur-inaj nek nur-virseksaj. Pro tio en multaj lingvoj novaj sekse neŭtralaj esprimoj estas proponataj kaj ekuzataj. Ankaŭ Esperanto ne estas escepto al tio, kiel montras interalie la fakto, ke dum la pasintaj jaroj - precipe en la junulara movado - la sekse neŭtrala pronomo "ri" iĝas pli kaj pli populara. En ĉi tiu prelego kaj diskutrondo ni konsideros la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de diversaj eblaj manieroj esprimi sin seksneŭtrale en Esperanto, kaj aparte fokusiĝos je J-riismo, nova propono, kiu celas eviti kelkajn el la problemoj de pli fruaj proponoj.

Martina Sachs-Bockelmann K: **Kurso de dancado - orientala kaj veldancado.** (2 x 28a kaj la 30a je 9:20)

Martin Strid **P: Stenografio internacia por la fonetika epoko.** Langola rapidskribo por komencantoj, eĉ nesciantoj. Tiu estas ne nur escepte facila stenografio, ne nur escepte esprimriĉa, sed eĉ escepte taŭga por Esperanto.

Maureen Hurstel - **Ĉinaj ombroj** (3 x)

Maureen Hurstel **Frenezaj fotoj** (2 x)

Mirjam Larissa Walter: ML/L: **Kreado de Tabuo-kartaro porinfana** (en du disaj programeroj: unu por infanoj, alia por gejunuloj) Ĉu vi ŝatas ludi per vortoj? Ĉu vi amuziĝas inventante klarigojn? Aŭ ĉu eble vi scivolos kien malaperas viaj gepatroj tutnokte kiam en la NoRo-programo oni anoncas ,Tabuo'-n? Venu kaj lernu kiel ludi ĝin! Ni faros nian propran kartaron, adaptita al infanoj, kaj tuj provos ĝin! Se vi ne parolas Esperanton denaske, laŭeble venu akompanata de gepatro. (Gepatroj ankaŭ bonvenas, ĉu por helpi siajn etulojn, ĉu por ampleksigi la kartaron porplenkreskulan.)

Nan Matthias-Wang K: Ĉiutagaj ekzercoj de **Ĉigongo**

Nicky Janssen – **Manlaboroj = ML** - diversaj ofertoj

Nicky Janssen - **Pijamaj rakontoj**

Nikola Markarian - **Kantado kun etaj infanoj.** Ĉi tie vi povas ekkoni kaj kunkanti la tipajn REF-infankantojn por malgrandaj infanoj. REF = Renkontiĝo por Esperanto-familioj, kie ĉiuj partoprenantoj estas denaskuloj aŭ bonaj parolantoj de Esperanto.

Pedro Hernandez K: **Antikva meza egipta lingvo.** Unuhora leciono: La prelego temas pri praktika leciono de la lingvo, por ke vi komprenu kiel ĝi funkcias, kiel oni legas la lingvon. La celo estas fine de la leciono legi veran tekston en la egipta.

Stefan Burkert: Ĉiutaga **komuna muzikumado** kiel en la pasintaj jaroj.

Tine Van Den Bruel pretas **ŝminki infanojn** (dum silvestra tago)

Tobias Menzel K: **Sindefendado** - Sukcesa sindefendado je 70% dependas de via interna sinteno kaj de via ekstera konduto kaj nur 30% de via bataltekniko/- kapablo. Pro tio estas tre grave trejni la propran aplombon (memfidon/memkonscio) kaj la lingvon de la korpo (gestiko, mimiko). Ni volas fari memdefendo- kurson por homoj, kiuj havas 10 ĝis 100 jarojn. Vi bezonas komfortajn vestaĵojn!

Toninho László (kaj Tony László) K: **Kurso por la kubo de Rubik** (3 x) -> **homoj alportu kubojn!!!** Venu por lerni kaj kunludi per kubo de Rubik (magia kubo)! Jes, kiel vi memoras, estas tia kubo kiu havas ses diversajn koloroj sur ses flankoj. Tri ebenaĵoj de la kubo estas laŭplaĉe turniĝeblaj ĉirkaŭ siaj aksoj, kaj la celo estas ke ĉiu flanko havu unuecajn kolorojn. Estas ne tiom facile, sed ankaŭ ne tiom malfacile - honeste! Montrante oni instruas, paŝo post paŝo.



Uli Diestel K: **Desegni per kreto**. Ni desegnos per kolor-kretoj kaj per la fingroj intenskolorajn bildojn de bestoj, fantazi-bestoj, fantazi-palaco aŭ de via plej ŝatata alia motivo. Taŭgas por infanoj (ek de 4/5 jaroj) kaj por ĉiuj aliaj interesitaj uloj. Daŭros iom pli ol uno horo.

Ulrich Matthias 1. **P**: Prezentaĵo kun projekciilo: **Vidindaĵoj de Wiesbaden** Tiu ĉi prelego okazos antaŭ la urbogvidado (vidu 2.). Mi prezentos la ĉefajn vidindaĵojn de *Wiesbaden* kaj la ĉirkaŭaĵo: konstruaĵojn, varmegajn fontojn, muzeojn ktp. Tiu ĉi prelego ankaŭ helpu la partoprenantojn decidi, ĉu indas partopreni en miaj programeroj n-ro 2.-4.

**E 2. Urbogvidado** (ĉ. 90 minutoj) Ni iros piede al la urbodomo (kun Esperanto-pavimŝtono antaŭ ĝi), la preĝejo *Marktkirche* kaj la *Landa Parlamento*, poste plu al la *Kurhaus*, al la *varmega fonto Kochbrunnen* kaj al la *Romia Pordego*.

**E 3. Muzeo Wiesbaden** (entute ĉ. 120 - 180 minutoj) Ni iros piede (25 minutojn) aŭ per buso (linio 14, ĝis Rheinstraße/Rhein-Main-Hallen) al tiu ĉi dubranĉa muzeo pri arto kaj natursciencoj. Ni vizitos ĝian aktualan specialan ekspozicion „Glaciepoka Vojaĝo“ („*Eiszeit-Safari*“) <https://museum-wiesbaden.de/eiszeit-safari>, kiu estas aparte interesa por infanoj, kaj la aliajn natursciencajn kaj artajn kolektojn. Por tiuj, kiuj interesiĝas pri malnovaj pentraĵoj, mi rakontos ion pri la ĉefaj majstroverkoj el la renesanca epoko. La muzeo tamen plej famas pro modernaj pentraĵoj, kiujn ĉiu povas rigardi individue. La enirprezo por grupoj ekde 15 personoj estas 7 eŭroj; infanoj sub 18 jaroj eniras senpage.

La ekskurso okazos 29-an de decembro je la 13:00a horo. La muzeo malfermas ĉiutage (ne 31a12a kaj 1a1a) je la 10-a kaj fermos vendrede jam je 17:00, sabate kaj dimanĉe je 18:00.

**E 4.** Vizito de glacisketejo la 30-an de decembro (90 ĝis 150 minutojn) Ni ekiros post la matenmanĝo kaj atingos post 12-minuta piedirado grandan glacisketejon sub libera ĉielo, la „*Henkell-Kunsteisbahn*“. La enirprezo estas relative malalta (kun 5-opa bileto € 2,68 por plenkreskuloj kaj € 1,34 por infanoj sub 18 jaroj). Aldoniĝas € 3,50 por prunteprenado de glacisketiloj, se oni ne kunportas proprajn. Vi povas laŭplaĉe reiri iam ajn - sed necesas forlasi la glacieron ĝis 11h50, ĉar tiam oni komencas poluri ĝin.

Valère Doumont K: **Mazi-kurso Esperanto-kurso por komencantoj kun Mazi-videoj (por infanoj kaj aliaj ☺)**

Valère Doumont L: **Go-kurso**: Enkonduko al ludo Go (2 x 120 minutoj)

Van den Bosch Eddy **P**: **Kio estas la rilato inter Esperanto kaj QR-kodoj** (kvadrataj skaneblaj rapidrespondaj kodoj)? (unua parto enkondukaj klarigoj; dua parto en formo de kvizo)

## Verdaj Skoltoj

1) la tradiciaj **ĉokoladaj bananoj**. (x 2)

2) Rolludo

3) **Fajro-skribado** (pyrogravure, brandmalerei, pyrografie, pirograbado)

4) **Kirigami** (tranĉita papero, faldi florojn)

Veronika Acsádi – estrino de la **Gufujo**

Veronika Acsádi - **Interkona vespero**

Wilhelm Knabe **P**: **De la hitlera junularo ĝis la verda partio - vivo kaj aktivo en diversaj Germanioj**. La 95-jara ekologo kaj politikisto Wilhelm Knabe legas el sia biografio. Kun traduko fare de Christoph Knabe

Wolfram Diestel - **Kvizo de ne kutimaj vortoj**

Yves Bellefeuille - **E-o-kurso por progresantoj**